Aguzantoj decidos pri la sorto de Esperanto!

Fariĝu aguzanto!

Radio Bervalio respondas al via demando: Kio estas aguzanto?

# PILO-PRESS

Internacia Informservo

N-ro 30/1973 28 nov 1973
Aperas ĉiusemajne

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

## Interparolo kun federacia ministro Dr. Klaus von Dohnanyi

Hamburg (uk/lkk) La 20an de novembro 1973 la alta protektanto de la sekvontjara 59a Universala Kongreso de Esperanto, federacia ministro pri Klerigado kaj Scienco Dr. Klaus von Dohnanyi, vizitis Hamburgon kaj faris tie gravajn interparolojn. Je tiu okazo ankaŭ kvarkapa delegacio de LKK parolis kun li. La prezidanto de LKK, d-ro Werner Bormann, transdonis al la ministro la lastajn numerojn de la revuo "esperanto" kaj de "Germana Esperanto-Revuo" kun la "oficiala komuniko" enhavanta la portretfoton de la ministro, kaj dankis al li pro lia preteco patroniĝi. La ministro menciis la fakton, ke dum la lastaj jaroj preskaŭ seninterrompe altaj ŝtatfunkciuloj patronis la kongresojn, demandis pri la tutmondeco de la Universala Kongreso kaj informiĝis pri la aliaj kongresligitaj konferencoj, el kiu li mem memoris tiun de la junularo. Rigardante sur la tekston de la "oficiala komuniko" li konstatis, ke li povas kompreni la Esperantlingvan tekston. Je la fino de la interparolo d-ro Bormann invitis la ministron mem veni al la 59a Universala Kongreso de Esperanto al Hamburg, kie li kiel edukfaka ministro povus elstarigi la ŝancegaligajn kapablojn de Esperanto en la fremdlingva instruo en la lernejoj. La ministro dankis kaj menciis, ke li nur pli poste decidos pri la datoj de la sekvonta somero.

*************************

## Esperanto kaj la Socialistaj Partioj

Romo (pp) Merkrede, la 21 nov 1973, okazis en la sidejo de la Partio Socialista Demokrata Itala, Sekcio de Romo, prelego kaj debato pri la temo: "La adopto de la internacia lingvo Esperanto je ekzameno de la Socialisma Internacio". La prelegon faris Franco Nicolazzi, direktoro de la Organiza Ofico de la Partio kaj la unua subskribinto de la leĝpropono n-ro 342, kiu antaŭvidas la enkondukon de la instruado de Esperanto en la italajn lernejojn. Franco Nicolazzi do estis la plej taŭga persono por ilustri celojn, perspektivojn kaj evoluon de tiu ĉi socialdemokrata propono, al kiu kelkaj kunfrataj partioj jam respondis favore. Inter la respondintoj troviĝas SPÖ (Socialista Partio de Aŭstrio), Mifleget haavoda (Partio de laboro de Israelo) kaj Partido Socialista Obrero Espanol (Ekzil-hispana socialista partio, Parizo). La israela socialista partio promesis subteni la proponon dum iu decida kunveno.

Merkata analizo de Esperanto

Nürnberg (pp) Kiel konate Inform-Centro Esperanto Nürnberg entreprenas grandskalan enketadon inter la esperantistoj pri iliaj sinteno kaj aktivecoj. Oni devas respondi al 13 demandoj. Kiel en aliaj aferoj ankaŭ en tiu enketado la esperantistoj estas inertaj kaj la respondoj alfluas nur malrapide.

En Pilo-Press N-ro 12/73 ni povis doni la rezul-tojn el la unuaj cent enketiloj. Intertempe ni analizis 302 enketilojn kaj sube ni donas la rezultojn de tiu analizo:

| Al la demandoj | respondis per Jes | respondis per Ne |
|---|---|---|
| 2) Ĉu vi lernis Esperanton? | 291 | 11 |
| 3) Ĉu vi sentas vin esperantisto? | 254 | 43 |
| 4) Ĉu vi parolas Esperanton resp. ĉu vi jam partoprenis Esperanto-konversacion? | 241 | 60 |
| 5) Ĉu vi korespondas en Esperanto? | 192 | 109 |
| 6) Ĉu vi partoprenas en Esperanto-aranĝoj? | 183 | 114 |
| 7) Ĉu vi legas Esperanto-literaturon? | 232 | 67 |
| 8) Ĉu vi legas Esperanto-revuojn? (Se jes, kiujn?) | 230 | 69 |
| 9) Ĉu vi aŭskultas al Esperanto-radioelsendoj? | 89 | 207 |
| 10) Ĉu vi estas membro de Esperanto-organizaĵo? | 209 | 91 |
| 11) Ĉu vi plue interesiĝas pri Esperanto? | 290 | 12 |
| 13) Ĉu vi deziras ricevi informojn pri Esperanto ankaŭ estonte? | 253 | 41 |

Komentoj

Esperanto-literaturo kaj revuoj estas gravaj faktoroj por Esperanto. Multaj esperantistoj nek korespondas nek partoprenas en Esperanto-aranĝoj. Surprize alta estas la nombro da esperantistoj, kiuj aŭskultas al Esperanto-radioelsendoj, temas ĉiukaze je 30 %. Ĉu la radiostacioj konscias pri tiu fakto? Verŝajne ne ĉiu, kiu aŭskultas, skribas al la stacioj. Preskaŭ 15 % ne sentas sin "esperantisto" kaj preskaŭ la sama procentaĵo ne ŝatas ricevi pliajn informojn.

Inform-Centro Esperanto daŭrigas la enketadon kaj petas pri alsendo de la enketiloj.

***********

Kunlaboro PEA - CLE

Varsovio (PEA) Kadre de la kunlaboro de la Pola Esperanto-Asocio (PEA) kaj Centra Laborrondo Esperanto (CLE) en Kulturligo de GDR venis al Varsovio, laŭ la invito de PEA, la konata Esperanto-aganto de GDR, aŭtoro de Esperanto-lernolibro, Ludwig Schödl. Li venis por prelegvojaĝo kombinita kun la projekciadoj de la nova Esperanto-sonfilmo de GDR "Hieraŭ ni estis ankoraŭ infanoj". La ĉefa prelego de Ludwig Schödl okazis ĵaŭde la 15 nov en la sidejo de la Centro pri Kulturo kaj Informado de GDR en Varsovio. Sekve L. Schödl prelegis en Lodzo kaj en Poznano. La viziton en Pollando la preleganto utiligis ankaŭ por kontaktoj kun polaj E-agantoj kaj por konatiĝi kun la pola sistemo de la eksterlerneja edukado de la junularo. Kiel li konfesis, aparte impresis lin la Junulara Palaco en Varsovio, unu el la plej grandaj junularaj edukejoj en Pollando.

## Homoj kaj Nomoj

## kun kaj sen Renomoj

**Leute von heute**

HANS-GEORG UNGEFUG, Vorsitzender des Bundes deutscher Nichtstuer aus Heiligenhafen, hat seine Mitglieder aufgefordert, Esperanto zu lernen. „Das ist so leicht, daß selbst ein Nichtstuer es spielend lernen kann." Zu den Ehrenmitgliedern des Bundes deutscher Nichtstuer gehören Klaus Havenstein, Sammy Drechsel und Erhard Keller.

Süddeutsche Zeitung
29 nov 1973 laŭ END 28.11.73

Hans-Georg Ungefug, prezidanto de la Asocio de Germanaj Nenionfarantoj, opiniis, ke oni faru pli multe por la internacia kompreniĝo kaj lernu Esperanton. Laŭ li ne estas paradokso, ke nenionfaranto lernu Esperanton, ĉar Esperanto estas facila. Pri la opinio de H.-G. Ungefug raportis ankaŭ Süddeutsche Zeitung laŭ informo de Esperanto-Nachrichten-Dienst (END), la germana eldono de Pilo-Press.

Karl Czernetz, la internacia sekretario de SPÖ, Socialista Partio de Aŭstrio, opiniis en letero al la Partito Socialista Democratico Italiano, ke en la nuna situacio la enkonduko de Esperanto kiel konferenclingvo de la Socialista Internacio nur signifus la enkondukon de aldona konferenclingvo. Laŭ li la naciaj socialdemokrataj partioj devus unue konvinki siajn delegitojn pri la neceso de Esperanto kiel la komuna lingvo de la socialistoj.

A. Manor, prezidanto de Esperanto-Ligo en Israelo, post multaj klopodoj ricevis promeson de la ĝenerala sekretario de la partio de laboro "Mifleget haavoda", ke la partio voĉdonos favore al la propono de enkonduko de Esperanto en la internaciajn rilatojn de la Socialista Internacio.

D-ro H. Maŝler, Tel Aviv, esprimis la opinion, ke nur pere de politikaj partioj ni povas atingi sukceson, neŭtraleco ĝis nun ne helpis nin kaj evidentiĝis ke ĝi ne gvidas nin al iu klara celo.

Heinz-Dieter Maas, prezidanto de Sarlanda Esperanto-Ligo, estis intervjuita de Studiowelle Saar pri la semajnfino en Kirkel.

*******************




*Amuzaj dialogoj en Esperanto*
Legolibro por komencantoj de Albert Lienhardt kun ilustraĵoj de Arfoll
12 x 21,6 cm, 141 paĝoj
prezo 4,70 GM

## Radio Bervalio respondas

D: Mi ne komprenas la vorton "aguzanto". Ĉu ne temas pri preseraro?

R: Ne estas preseraro. "Aguzanto" estas la ideala esperantisto, kiu estas aganto kaj uzanto de Esperanto samtempe.

***********

D: Kial la borado de la esperantistoj ĝenerale ne estas tre efika?

R: Ili boras ĝenerale en la sama truo!

***********

D: Ĉu nenionfaranto povas lerni Esperanton?

R: Jes, por li Esperanto havas neniun valoron!

***********

La 15a de decembro estas la tago de la Esperanto-libro! Ĉu vi jam aĉetis vian Esperanto-libron? Mendu ĉe
Ludwig Pickel, libroservo, 85 Nürnberg 1
Postfach 2113, PSchK Nürnberg 819 56-851

Kio kaj Kie?

Regiona kunveno en Duisburg

Revelo, la Rejnlanda-Vestfalia Esperanto-Ligo, invitas al jara kunveno en Duisburg, dimanĉe la 9 dec 1973, je la 10a horo, en kunsidejo de Hauptbahnhof Duisburg.

Bedaŭrinde pro la dimanĉa malpermeso, veturi per aŭtomobilo en FRG, Pilo-Press kaj Libroservo Pickel ne povas partopreni. Jen, do sentiĝas ankaŭ la oleo-krizo ĉe Esperanto-kunvenoj.

Zamenhof-festoj en FRG

Sabate, la 8 dec 1973, je la 16 horo, en Schwelm, Drosselstr. 14
Informojndonas:Heinz Schindler, 583 Schwelm, Bahnhof

Sabate, la 8 dec 1973 je 19a horo, en Stuttgart, Hotel am Marktplatz
Informojn donas: S-ino Maria Vogel, 7 Stuttgart 1, Kniebisstr. 31
Tel. 260185

Sabate, la 15 dec 1973, je la 14a horo, en Pfaffenhofen norde de Munkeno, en hotelo"Bortenschlager" am Hauptplatz. Komuna aranĝo de grupoj Munkeno kaj Pfaffenhofen kaj SOBELO.
Informojn donas: Horst Spirat, 8 München 2, Arnulfstr. 22
Tel. 592461
En tiu kunveno partoprenos Pilo-Press kaj Libroservo Ludwig Pickel, kiu ekspozicios kaj vendos Esperanto-librojn!

Ĵaŭde, la 20 dec 73, Zamenhof-festo en Hamburgo. Pri detaloj informiĝu ĉe Hamburga Esperanto-Societo, 2 Hamburg 26, Elise-Averdieck-Str. 34, Tel. 25 29 36.

****************

Esperanto en la radio

Varsovio: La posttagmezaj elsendoj de Varsovio ne ĉiam estas plezuro, ekde kelka tempo. Perturboj preskaŭ malebligas la aŭskultadon. Ankaŭ nun, kiam mi skribas tiun linion, mi nur tute mallaŭte aŭdas la stacion sur ondo 41 meze inter meze inter bruo kaj aliaj voĉoj. La ondo 31 m entute ne estas kaptebla. - La matena programo estas bone aŭdebla sur la meza ondo 200 m, sed verŝajne por multaj homoj ne estas eble, matene je la 6a horo aŭskulti. Ĵaŭde, je la 29a nov 73, je la 6a oni reaŭdigis la antaŭtagan komentarion pri la "inflacia epidemio" en la kapitalistaj landoj. Ni mem sentas la efikon de la malvalorigo de la mono, sed la esprimon "inflacio" mi ne ŝatas, kvankam oni uzas ĝin ankaŭ en la okcidento kaj en nia lando. Laŭ niaj germanaj spertoj "inflacio" estas la totala neniigo de la valuto, kiel okazis 1923 kaj 1948. Nia ekonomio kaj vivmaniero baziĝas je la principoj de dinamikismo kaj en tio ĉiam estas la risko de la plialtigoj de la prezoj. Sed mi ne volas defendi la "inflacion". Sed laaserto, ke ĝin kaŭzas la militara buĝeto, i.a., en la nuna momento ne estas ĥepre ĝusta. Pli multe momente kontribuas al tiu inflacia evoluo la olea bojkoto de la naftaj potentatoj. Kaj tiu bojkoto montras efike, sur kiuj ŝanceliĝaj kruroj staras la internacia kunlaboro. - Interesa estis la kultura-scienca magazino, en kiu oni ankaŭ eksciis pri la apero de la 13a numero de La Monda Lingva Problemo. - Okazis miraklo! Kiam komenciĝis la ĵaŭda leterkesto ( 29 nov 73) la Varsovia voĉo fariĝis klara kaj laŭta. Citaĵo el letero de konata aŭskultanto el Sovetunio. Laŭ li leteroj al la redakcio estas plej efike responditaj se ili influas la programon! - Berno En la merkreda elsendo Berno prezentis la intervjuon de Ludwig Robel kun A. Münnich pri la signifo de la komputistiko je Esperanto. Ĉu la komputero, la politikistoj, sciencistoj decidos la sorton de Esperanto? Laŭ mi la uzantoj de Esperanto estas la decida forto!